Gültig

INTERNACIA FEDERACIO DE LA ARTAJ KAJ KULTURAJ FERVOJISTAJ ASOCIOJ

S T A T U T O J

ART.1 - NOMO KAJ SIDEJO DE LA FEDERACIO

La Federacio estas nomata :
Franclingve : Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots (F.I.S.A.I.C.).

Germanlingve : Internationaler Kultur – und Freizeitverband der Eisenbahner (F.I.S.A.I.C.).

La sidejo estas tiu de la Franca Unuiĝo " Union Artistique et Intellectuelle des Cheminots Français " (U.A.I.C.F.) 7 rue de Château Landon - PARIS 10ème.

ART. 2 - CELOJ DE F.I.S.A.I.C.

F.I.S.A.I.C. celas :

a) Kreskigi kaj akceli la kulturajn agadojn de la fervojistoj el la diversaj nacioj en kamaradeca spirito.

b) Tiucele starigi rilatojn inter la Naciaj Unuiĝoj de fervojistaj kulturaj asocioj.

c) Organizi internaciajn fervojistajn kulturajn manifestaciojn, tiamaniere konigi kaj stimuli iliajn kulturajn agadojn.

F.I.S.A.I.C. estas neŭtrala koncerne la politikajn, sindikatajn kaj religiajn aferojn.

ART.3 – RIMEDOJ

F.I.S.A.I.C. estas administra laù la franca leĝo, tielnomata leĝo de 1901, tio estas sen profitodona celo. Ĝiaj monrimedoj rezultas el la membraj kotizoj, donacoj kaj diversaj enspezoj kiuj devas esti severe mastrumataj.

Eventuala profito el la finkalkuloj aldoniĝas al la la komuna havo, kiu kompensos laŭokazajn deficitojn.

Kaze de nesufiĉaj monrimedoj, plia kotizo estos postulita, proporcie al la antaŭa financjaro.

ART. 4 – MEMBROJ

F.I.S.A.I.C. konsistas el aktivaj kaj honoraj membroj.

a) Povas esti akceptataj kiel aktivaj membroj :

- La naciaj fervojaj retoj.
- La fervojistaj naciaj asocioj kiuj praktitas kulturajn agadojn sen monprofito.

La F.I.S.A.I.C - membreco povas esti petita de iu ajn asocio , ĉu en sia propra nomo ĉu en la nomo de aliaj asocioj de sia lando kiuj tion deziras kaj kies ĝi estos la kvalita komisiito, atendante la starigon de nacia unuiĝo.

Ĉiu lando rajtas esti reprezentata nur unu fojon ĉe F.I.S.A.I.C.; tiuj kiuj enhavas plurajn asociojn , devos fondi nacian unuiĝon en kiu estos arigitaj la asocioj kiuj deziras partopreni en la F.I.S.A.I.C.- agadoj.

b) Povas esti nomumitaj honoraj membroj, personoj kiuj akiris specialajn proprajn meritojn per sia kontribuado al la disvolvado de F.I.S.A.I.C.

ART.5 – KOMENCO DE LA MEMBRECO.

Kandidato kiu deziras fariĝi aktiva membro de F.I.S.A.I.C. sendas skriban peton al la ĝenerala sekretario, kiu ĝin submetas al la venonta kunsido de la prezidio aŭ de la ĝenerala kunveno.

La F.I.S.A.I.C. - aniĝo rezultas de decido far la prezidio aŭ la ĝenerala kuveno.

Antaŭ sia oficiala akcepto, kandidato povas partopreni en :

- ĝenerala kunveno pere de observanto.
- F.I.S.A.I.C. - manifestacioj laŭ kondiĉoj aparte difinitaj ĉiuokaze.

ART . 6 – FINO DE LA MEMBRECO

La membreco ĉesas per demisio aŭ per eksigo, oficiale komunikita per registrata letero.

La eksigo de membro povas esti deklarata kiam li :

- kontraŭagas en la prestiĝo aŭ la interesoj de F.I.S.A.I.C.
- malobservas la statutojn.
- ne pagas sian kotizon pli longe ol du jaroj

La rajtoj kaj devoj de membroj finiĝas la morgaŭan tagon de la recepto de la demisia letero. Demisio aŭ eksigo ne liberigas de la pagenda kotizo dum la kuranta administrojaro.

La prezidio povas decidi provizore prokrasti la rajtojn de membro antaŭ ol la ĝenerala kunveno estu decidinta lian eksigon. La perditaj avantaĝoj dum la provizora eksiga tempo, neniam estos pagitaj same kiel la repago de la kotizo kaj iu ajn monkompenso.

ART.7 – DEVOJ DE LA MEMBROJ

La devoj de la membroj estas la jenaj :

a) la membroj devas kreskigi kaj favori la celojn de F.I.S.A.I.C. priskribitaj en la art.2.
b) la membroj, krom la honoraj membroj, pagas jarkotizon laŭ sia memvolo. Tamen, tiu kotizo ne povas esti pli malalta ol la sumo decidita de la prezidio aŭ la ĝenerala kunveno. La membroj devas pagi sian kotizon al la ĝenerala kasisto de F.I.S.A.I.C..
c) la membroj partoprenante en la F.I.S.A.I.C.-manifestacioj devas mem pagi siajn partoprenokostojn.

ART.8 – ORGANOJ DE F.I.S.A.I.C.

a) la ĝenerala kunveno,
b) la prezidio,
c) la kontorevizio-komisiono.

ART.9 – ĜENERALA KUNVENO

La ĝenerala kunveno konsistas el delegitoj de la aktivaj membroj, maksimume tri po nacia Unuiĝo.

Ĉiu membro disponas pri unu voĉo. Skribe, li povas transdoni siajn rajtigilojn al alia membro. Tamen, neniu membro povos, pro tio , disponi pli ol tri voĉoj, inkluzive la sia.

Principe, la voĉdonoj okazos per manlevo. Escepto povas esti farita por la elekto per sekreta balotilo de membroj de la prezidio, se iu membro tion postulas. Tiu metodo povas esti aplikebla por ĉiu voĉdonado laŭ peto de la plimulto.

La decidoj estas prenitaj per simpla plimulto de la voĉoj. Kaze de egaleco de la voĉoj, la prezidanto havas decidpovavoĉon.

Ĉiuj decidoj rilate al modifo de la statutoj aŭ al malfondo postulas plimulton je du trionoj de la voĉoj.

La honoraj membroj povas ĉeesti la ĝeneralan kunvenon kiel konsilantoj.

ART.10 – ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

la ordinara ĝenerala kunveno okazas ĉiudujare (para jaro), principe en aŭtuno. Interkonsentite kun la organizanta nacia unuiĝo, la dato estas difinita de la antaŭa ĝenerala kunveno aŭ de la prezidio de la antaŭa jaro.

La loko kaj la programo de la kunveno estas difinitaj konsentite kun la ĝenerala prezidanto kaj la ĝenerala sekretario far la organizanto, kiu invitas la aktivajn membrojn. La honoraj membroj estas invitataj de siaj naĉiaj unuiĝoj.

Unu monaton antaŭ la kunveno, la ĝenerala sekretario sendas al la diversaj membroj la tagordon, la agadraporton, la jarkontojn, la buĝeton kaj la kromajn dokumentojn.

La ĝenerala kunveno valide interkonsiliĝas kia ajn estu la nombro de la membroj ĉeestantaj aŭ reprezentataj.

ART.11 – EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

Eksterordinara kunveno devas esti konvokita laŭ decido de la prezidio aŭ laŭ motiva peto de unu triono el la aktivaj membroj. Tiuokaze, ĝi kunsidos en la lando de unu el la membroj kiuj petis la kunvenon , tiu membro devos prizorgi la kunvenon.

La antaŭviditaj aranĝoj de la ordinara ĝenerala kunveno estas aplikeblaj.

ART.12 – KOMPETENTECO DE LA ĜENERALA KUNVENO

La ĝenerala kunveno estas interalie kompetenta por :

a) difini la F.I.S.A.I.C. ĝeneralan politikon koncerne la kulturajn interŝanĝojn kaj la sekvendajn direktivojn fare de la prezidio.
b) aprobi , se necese la protokolon de la antaŭa ĝenerala kunveno (kun rezervo pri art.18 d).
c) aprobi la agadraporton, la du pasintajn jarkontojn kaj la buĝetojn de la du venontaj jarkontoj.
d) Elekti la membrojn de la prezidio kaj de la komisio konto-revizio.
e) Akcepti aktivajn membrojn kaj decidi pri la sumo de ilia kotizo.
f) Nomumi honorajn membrojn.
g) Eksigi membrojn.
h) Decidi pri la proponoj de la prezidio.
i) Pritrakti aferojn kiuj, pro tempo-kaŭzoj ne povis esti antaŭe diskutitaj de la prezidio, tio kun la principa konsento de du trionoj el la voĉoj de la ĉeestantaj aŭ reprezentataj membroj .
j) aprobi la kalendaron de la manifestacioj.
k) Modifi la statutojn (kun rezervo pri art.9,
l) Modifi la internan regularon.
m) Aprobi la regularojn ankaŭ iliajn modifojn kaj postajn kompletigajn aldonojn, skribitaj laŭ art.21.

ART.13 PRESIDIO

a) La prezidio konsistas el :

- La ĝenerala prezidanto,
- La adjunkta prezidanto,
- Les kvar vicprezidantoj,
- La ĝenerala sekretario,
- La ĝenerala kasisto.

La prezidanto, lia adjunkto, la sekretario kaj la ĝenerala kasisto estas individue elektitaj ; ili devas esti aprobitaj de sia nacia unuiĝo. Ili estas ankaŭ delegitoj de siaj unuiĝoj en la ĝeneralaj kunvenoj.

La vicprezidantoj ne estas individue elektitaj. La funkcioj de vicprezidantoj estas transprenitaj de la naciaj unuiĝoj kiuj sin deklaras pretaj por preni sur sin la ŝarĝojn. F.I S.A.I.C. rekomendas ke iu unuiĝo elektita kiel vicprezidanto nomu reprezentanton, kiun ĝi persone komisias por plenumi tiun taskon.

La prezidio pova komisii aktivan membron por plenumi , ĝis la venonta ĝenerala kunveno, la funkciojn de iu membro kiu, ne povas aŭ ne plu volas ilin plenumi.

La mandatoj estas atribuitaj al la diversaj membroj, tiel ke neniu nacia unuiĝo prenu sur sin pli ol unu mandato.

b) Daŭro de la mandatoj

La individue elektitaj membroj de la prezidio estas elektitaj por la du venontaj kalendaraj jaroj. Ili estas reelekteblaj.

La vicprezidantoj estas elektitaj por la kvar venontaj kalendaraj jaroj, sed ili ne estas tuj reelekteblaj. La renovigo devas esti farita tiel ke la mandato de du vicprezidantoj ne komencu samtempe kun tio de du aliaj vicprezidantoj.

c) Kostoj

Ĉiuj F.I.S.A.I.C.-funkcioj estas senpagaj. La elspezoj estas repagitaj nur al la individuaj elektitaj membroj , ankaŭ al personoj komisiitaj far la prezidio por reprezenti F.I.S.A.I.C.

d) Kunsidoj de la prezidio

La neparaj jaroj, la prezidio kunsidas en aŭtuno.

La kontrevizoroj ĉeestas ĉiujn kunsidojn de la prezidio per konsultiĝa voĉo. La nemembraj landoj de la prezidio povas partopreni en kunsidoj per konsultiĝa voĉo .

Ĉiuj proponoj, franclingve kaj germanlingve devas esti submetitaj al la ĝenerala sekretario sesdek tagojn antaŭ la dato de la prezidia kunveno.

La loko kaj la dato estas difinitaj de la ĝenerala prezidanto, interkonsentite kun la nacia organizanta unuiĝo .

La organizanto invitas la aktivajn membrojn.

Unu monaton antaŭ la kuveno, la ĝenerala sekretario sendas al la membroj la tagordon, la agadraporton, la jarkontojn, la buĝeton kaj la kromajn dokumentojn.

La prezidio valide interkonsiliĝas kiam almenaŭ kvin membroj ĉeestas. La membroj de la prezidio disponas ĉiu po unu voĉo.

La instrukcioj de la art. 9, krom tio, estas analogie aplikeblaj.

La ĝenerala prezidanto aŭ la ĝenerala sekretario rajtas ĉiumomente konvoki la prezidion.

ART.14 – KOMPETENTECO DE LA PREZIDIO

La prezidio estas precipe komisiita por :

a) taŭge klopodi por atingi la F.I.S.A.I.C.-celojn aŭ tiusence fari proponojn al la decido de la ĝenerala kunveno ;
b) prizorgi la plenumadon de la decidoj de la ĝenerala kunveno ;
c) prepari la ĝeneralan kunvenon ; tiucele, ĝi esploras ĉiujn proponojn submetitaj al la ĝenerala sekretario kaj donas sian opinion pri tio ;
d) akcepti aktivajn membrojn kaj decidi pri la sumo de ilia kotizo ;
e) kontroli la lastajn jarkontojn, eventuale modifii la buĝeton por la kuranta jaro kaj prepari la buĝeton de la venonta jaro ;
f) prepari la kalendaron de la manifestacioj kaj finarangi la F.I.S.A.I .C.-reprezentadon far unu el ĝiaj membroj ;
g) decidi pri la starigo, kaj, se necese, pri la konvokado de limigitaj teknikaj komitatoj kaj de teknikaj komisionoj ŝarĝitaj pritrakti la aferojn specifikaj al la kulturaj grupoj ;
h) prepari la ratifikon de la regularoj skribitaj laŭ art.21 ;
i) aldoni, se necese, korektojn kaj kompletigaĵojn al la buĝeto de la venonta jaro ;
j) starigi la kalendaron de la manifestacioj por la venonta jaro, kiam la pasinta ĝenerala kunveno tion ne definitive decidis ;
k) aprobi la modifojn kaj la aldonojn de regularoj skribitaj laŭ art.21, kiam neniu kontraŭdiro ne estas farita far unu el ĝiaj membroj.

ART.15- INTERNA REGULARO

Interna regularo kompletigante la instrukciojn de tiuj statutoj estas adoptita de la plimulto de la ĝenerala kunveno.

ART.16 – KOMPETENTECO DE LA ĜENERALA PREZIDANTO

La ĝenerala prezidanto reprezentas F.I.S.A.I.C.n kaj prezidas la ĝeneralajn kunvenojn kaj la kunsidojn de la prezidio.

Kaze de malebligo, la adjunkta ĝenerala prezidanto anstataŭas lin.

ART.17 – KOMPETENTECO DE LA ADJUNKTA ĜENERALA PREZIDANTO

Kaze de malebligo de la ĝenerala prezidanto, la adjunkta ĝenerala prezidanto gvidas la kunsidojn de la prezidio kaj de la ĝenerala kunveno. Li estas ŝargita helpi kaj apogi la klopodojn de la landoj kiuj deziras venonte aliĝi al F.I.S.A.I.C.

ART.18 – KOMPETENTECO DE LA ĜENERALA SEKRETARIO

Konforme al la statutoj kaj sub la respondeco de la ĝenerala prezidanto, la ĝenerala sekretario plenumas la F.I.S.A.I.C.-administradon.

Li estas precipe ŝarĝita :

a) konservi la ligadon inter la F.I.S.A.I.C.-membroj kaj la aliaj internaciaj organizoj ;
b) prepari la tagordon de la ĝeneralaj kunvenoj kaj de la prezidiaj kunsidoj ;
c) starigi la agadjaraporton kaj la projektan komentarion rilate al la ekzamenotaj gravaj aferoj ;
d) Verki la protokolojn de la ĝeneralaj kunvenoj kaj de la prezidiaj kunsidoj.

Protokolo estas konsiderata kiel akceptita se, dum la du monatojn kiuj sekvas ĝian sendon, neniu kontraŭdiro estas farita ; eventuala kontestebla punkto estus submetita al la ĝenerala kunveno aŭ en prezidiaj kunsidoj.

ART.19 – KOMPETENTECO DE LA ĜENERALA KASISTO

La ĝenerala kasisto mastrumas la komunan posedaĵon de F.I.S.A.I.C. kadre de la aprobitaj buĝetoj. Liaj personaj elspezoj estas submetitaj al la aprobo de la ĝenerala prezidanto.

La ĝenerala kasisto starigas la jarajn kontojn (finkalkulaj rezultoj kaj bilanco) kaj ilin prezentas okaze de la prezidia kunsido, kun la pravigaj dokumentoj , al la kontrevizoroj.

Li starigas la projekton pri la jara buĝeto.

La kontado estas tenata en svisaj frankoj.

La kontjaro estas la kalendara jaro.

ART.20 - KONTREVIZORA KOMISIONO

La ĝenerala kunveno elektas por kvar kalendaraj jaroj du naciajn unuiĝojn kiuj ne apartenas al la prezidio, kies delegito agos kiel kontrevizoro. Ĉiudujare nur unu nacia uuiĝo estas elektita .

Dum la prezidia kunsido, la kontrevizoroj kontrolas la jarajn kontojn per la originalaj pravigaj dokumentoj ; ili faras sin certaj pri la ekzistado de la monhavaĵo.

Ili raportas al la prezidio kaj al la ĝenerala kunveno.

Kaze de neĉeesto , la prezidio nomumas unu aŭ du anstataŭantajn kontrevizorojn

ART.21 – TEKNIKAJ KOMISIONOJ

Por ĉiuj kulturaj agadoj subtenitaj de F.I.S.A.I.C. povas esti kreitaj, se necese, teknikajn komisionojn, kies la laborkunsidoj okazos kadre de iu F.I.S.A.I.C.- manifestacio.

La taskoj de la komisionoj konsistas starigi regularojn precizigante la teknikajn kondiĉojn por partopreni konkursojn, la konsiston de la juĝantaro, la maniersendon de la objektoj kaj ellaboraĵoj, la kriteriojn por atribui medalojn kaj distingaĵojn, ktp. Tiuj decidoj, nure teknikaj, ne estas submetitaj al ratifiko de la prezidio aŭ de la ĝenerala kunveno, se ili ne havas financajn reagojn por la naciaj unuiĝoj. Krome, dum la kunvenoj, oni interŝanĝos akiritajn spertojn cele perfektigi la venontajn manifestaciojn.

La prezidantoj de la teknikaj komisionoj devas raporti pri siaj misioj en la ĝenerala kunveno pere de la kunorganisigisto (vidi la artikulon 6 de la interna reglemento).

La funkciado de la teknikaj komisionoj estas administrata per la interna regularo.

ART.22 - ARBITRACIA KOMISIONO

Ĉiu konflikto inter aktivaj membroj estas, kiam eblas neniu akordiga bazo, prezentata al la arbitracia komisiono.

Tiu komisiono konsistos el tri personoj. Ĉiu konflikpartio nomumos arbitracianton el alia nacia unuiĝo ; tiuj du arbitraciantoj akordiĝos por elekti trian arbitracianton kiu plenumos la funkciojn de prezidanto.

Kaze de neebla akordigo pri tiu tria arbitracio, la ĝenerala prezidanto lin nomumos.

ART.23 - RESPONDECO

F.I.S.A.I.C. ne prenas sur si respondecon pri siaj membroj kaj komisiitoj.

ART.24 – OFICIALAJ LINGCOJ

La oficialaj lingvoj konsentitaj de F.I.S.A.I.C. estas la germana kaj la franca. Tamen, aliaj lingvoj povas esti uzeblaj dum la kunvenoj.

La interŝanĝo de korespondado devas esti farita precipe en unu el la oficialaj lingvoj. Kaze de kontesto, aŭtentigas la franca teksto de la statutoj.

Tiuj dispozicioj estas kompletigitaj per la interna regularo.

ART.25 – MALFONDO DE F.I.S.A.I.C.

La malfondo de F.I.S.A.I.C. povas est decidita nur de ĝenerala kunveno, speciale tiucele konvokita. Kaze de malfondo, tiu kunveno decidas de la dispartigo de la komuna havaĵo. Eventuala deficito estus kovrita konforme al la art.3, 3a alineo.

ART.26 – EKVALIDO KAJ PROVIZORA DISPOZICIO

La nunaj statutoj estis adoptitaj de la ĝenerala kunveno la 26-30ajn de septembro 2002. Ili anstataŭas tiujn de la 12-14ajn de oktobro 1986.

Tradukita el la franca lingvo
pere de F.F.E.A.
julio 2003